

Joseph Essertier

Nagoja Instituto pri Teknologio, Japanio

La nerealigita kaj forgesita potenco de Esperanto

Raciigi kaj demokratiigi lingvon en Ĉinio Opinia artikolo

Resumo: En la nunaj Ĉinio kaj Japanio, infanoj povas legi gazetojn nur post kiam ili ellernis kelkajn milojn da ĉinaj signoj. Objektive, ni povas diri ke, por miliardo da homoj, la ĉina skribo estas granda obstaklo. Ĝi estas malhelpo por akiri informojn, kunhavigi informojn kun aliaj homoj, kaj partopreni en la socio. Unu el la celoj de la latiniga movado en Ĉinio kaj Japanio estis pligrandigi la nombron de legokapablaj homoj.

Ĉi tiu artikolo pritraktas la demandon, “Kiu estas la historiaj radikoj de hanyu-pinjino, la hodiaŭa sistemo por skribi la ĉinan per la latina alfabeto?” Mi klarigas la ligojn inter la fruaj stadioj de la Esperanto-ideo kaj movado en Ĉinio kaj Japanio unuflanke, kaj starigo de hanyu-pinjino aliflanke, enfokusigante kiel kreskis la revo pri latinigo de la ĉina skribo el la Esperanto-movado kaj rilataj lingvoreformaj movadoj kiuj celis la raciigon kaj demokratiigon de la verkado

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Demokratio; Inkluziva; Ĉinio; Latina alfabeto

1 Scio ne perdenda

Ĝis nun mi ĉefe verkis pri Japanio, sed hodiaŭ mi parolos plejparte pri Ĉinio. Mi scivolas, kion Zamenhof dirus kaj skribus, se li vivus hodiaŭ. Kion li dirus pri la demandoj: kiel konstrui pacon, fratecon, egalecon kaj demokration?¹

Ni ĉiuj povas konsenti, ke Zamenhof kreis tre valoran aferon, kiam li estigis ĉi tiun lingvon. Dum jaroj da esplorado pri la japana esperantisto Saitō Hidekatsu (1908-1940) mi eksciis, ke multaj esperantistoj antaŭenigis demokration kaj egalecon. Kaj kion mi plej volas diri al vi ĉiuj hodiaŭ, estas, ke mi havas la impreson, ke la nobla historio de Esperanto estas atakata, aŭ ĝi estas forviŝita, aŭ junuloj ne lernas pri ĝi. Io misas.

1 Pri tiu ĉi temo mi verkis pli detale en pli frua artikolo (Essertier 2021).

Kiel pruvo pri tio, pri kio mi parolas, bonvolu rigardi kio disponeblas ĉe Vikipedio nun. Ĉu iu en Usono aŭ Japanio aŭ Ĉinio — mi volas diri iu, kiu interesiĝas pri la historio de Esperanto — povas facile ekkoni la bazan historion de la vivo de Ba Jin (1904-2005) aŭ Saitō Hidekatsu? Dum unu horo da legado pri hanyu-pinjino en Vikipedio, ĉu oni informiĝos probable pri la ĉefaj kontribuoj, kiujn faris esperantistoj al la evoluo de hanyu-pinjino? (Hanyu-pinjino estas la latin-alfabet-bazita skribmaniero uzata por latinigi la ĉinan skribon hodiaŭ.)

Kiu parolas pri ĉi tiu kontribuo? Kiu diras al ni, ke esperantistoj pavimis la vojon al hanyu-pinjino? Eble iu devus diri “dankon” al ili.

Ĉu homoj legos, ke Zamenhof pruvis, pli ol iu ajn, ke lingvo povas esti sistemigita, raciigita kaj simpligita laŭ la revo de inkluziva dezajno (aŭ universala dezajno)? La respondo al ĉiuj tiuj demandoj estas “ne”.

Estas tre neverŝajne, ke oni aŭdos ion pri tio. Mi pasigis multajn horojn serĉante informojn pri esperantistoj en Vikipedio, precipe pri la kontribuoj de esperantistoj al la raciigo de la skribmaniero de Ĉinio kaj Japanio, kaj mi trovis preskaŭ nenion tie. Eĉ serĉi en Guglo ne donis al mi multon. Ekzistas nur kelkaj artikoloj de profesoroj, kiel tiuj de Gotelind Müller kaj Gregor Benton (2006a,b).

2 Latinigi la ĉinan skribon

Ĉinio havas preskaŭ unu miliardon kaj duonon da loĝantoj, do kompreneble, estas multaj homoj kiuj volas scii pri la historio de hanyu-pinjino, kaj en Ĉinio kaj ekster Ĉinio.

La unua organizaĵo por promocio de Latinxua estis starigita de grupo de ŝanhajaj Esperantistoj. Tio estis en aŭgusto 1934 (DeFrancis 1950, 114). Ilia unua ĉinlingva broŝuro estis titolita *La latinigo de ĉina skribo*, kaj ĝi estis tre populara. Denove tio montras la ligojn inter la latina skribo kaj Esperanto. Esperanto devis esti skribita en latina skribo, kaj do el la perspektivo de ĉinaj esperantistoj, lerni la latinan alfabeton estis la unua obstaklo por studentoj.

Müller kaj Benton klarigas, “En la 1930-aj jaroj ĉinaj esperantistoj iĝis pli aktivaj en ĝeneralaj lingvaj aferoj, aparte la latiniga movado, kiu ricevis subtenon de sovetiaj esperantistoj. La ĉinaj esperantistoj proponis la adopton en Ĉinio de la sistemo de romanigo (Latinxua Sin Wenz) kreita de la sovetianoj por sia propra ĉina malplimulto, kaj tiel malfermis la vojon al hanyu-pinjino, evoluigita en Ĉinio en la 1950-aj jaroj”.²

2 “In the 1930s, Chinese Esperantists became more active in general language issues, particularly the latinisation movement, which received support from Soviet Esperantists. The Chinese Esperantists proposed the adoption in China of the system of romanisation (Latinxua Sin Wenz) created by the Soviets for their own Chinese minority, and thus paved the way for Hanyu Pinyin, developed in China in the 1950s ...” (Müller kaj Benton 2006b, 182).

DeFrancis esprimis ĝin jene: “Poste la Ŝanhajaj organoj de la ĉinaj esperantistoj traktis la temon de latinigo en preskaŭ ĉiu el siaj kajeroj” (DeFrancis 1950, 171).³ Latinigo estis grava temo por ĉinaj esperantistoj, kaj iusence, ili antaŭis japanojn rilate sian lukton kontraŭ lingva imperiismo.

Por tiuj el vi, kiuj ne konas la terminon “lingva imperiismo”, mi mallonge klarigos. Esperantistoj foje batalis kontraŭ tio, kion oni nomas “lingva imperiismo”. Dum la 1920-aj jaroj kaj 1930-aj jaroj en Japanio kaj Ĉinio, la koloniistoj de la Imperio de Japanio devigis homojn de diversaj etnecoj vivantaj en Tajvano, Koreio, Filipinio, kaj aliaj landoj uzi la japanan anstataŭ sia gepatra lingvo. (Tio estas tipa aŭ “klasika” lingva imperiismo.) Eĉ al parolantoj de aliaj specoj aŭ “dialektoj” de la japana, kiel homoj de la Ryukyu-Insuloj, ofte estis malpermesite uzi sian gepatran lingvon en la lernejo. Por multaj ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, la lingvo Esperanto proponis eliron el tiu ĉi perforta cirklo. Esperanto estis maniero eskapi de naciismo, militismo, ŝtatismo, kaj rasismo. Efektive, “Esperanto” donis esperon al miloj da ĉinoj kaj japanoj pri paco, demokratio kaj memdeterminado. Ilia revo estis fini la lingvan imperiismon.

La historion de la progresemaĵoj ĉinoj, kiuj subtenis Esperanton en ĝiaj fruaj tagoj, nur nun oni komencas rakonti, kaj unu aspekto de tiu rakonto estas tiu de la ĉinaj anarkiistoj, kiuj subtenis Esperanton. Elstaras la esploro de Müller kaj Benton (2006a,b; Müller 2001/2013). Ili klarigas, fakte, ke la Esperanto-movado ricevis frue subtenon de ĉinaj anarkiistoj⁴ en Japanio kaj Francio, kaj nur poste akiris iom da subteno inter komunistoj.

Male al okcidentaj anarkiistoj, orientaziaj anarkiistoj tre interesiĝis pri lingvaj aferoj. Modernigaj reformistoj en Orientazio ĉirkaŭ 1915 estis kritikistoj de Konfuceismo kaj subtenantoj de scienco kaj demokratio. Ili atakis la ĉinan skribsistemon kaj la uzon de la klasika ĉina kaj postulis literaturan revolucion kaj la apogon de la popollingvo, konata kiel baihua. Baihua (白話) estas la vorto en la ĉina por skriba vulgara/parollingva ĉina (白話文), la norma skriba formo por mandareno kiu estas metita en opozicion al literatura ĉina.

Hidekatsu estis verŝajne marksisto, sed li estis vera internaciisto kaj plene rifuzis imperiismon. Hidekatsu estis simila al Lu Xun (Lusin, 1881-1936).⁵ Ili ambaŭ raciigis skribon. Ili ne timis vulgaran skribon.

3 “Thereafter the Shanghai organs of the Chinese Esperantists dealt with the subject of Latinization in almost every one of their issues.” (DeFrancis 1950, 171)

4 Por komencantoj pri anarkiismo: Anarkio estas kaoso, sed anarkiismo ne estas kaoso. Anarkiistoj estas kontraŭ la nacia ŝtato. Ni estas kontraŭ sociaj hierarkioj, kiel patriarkismo, malegaleco kaj rasismo.

5 Lu Xun (Lusin) estis unu el la plej influaj ĉinaj verkistoj de la dudeka jarcento kaj la fondinto de la moderna baihua [白話], ankaŭ konata kiel la vulgara ĝenro.

Hidekatsu farus ion ajn por raciigi la lingvon, eĉ permesante kaj legitimante stigmatizitan lingvaĵon kiel ekzemple vortojn el “provincaj dialektoj”, “strata parolado”, “vulgara” aŭ parolata lingvo, do estas kompreneble, ke li antaŭenigis kaj la Esperanto-movadon kaj la latinigan movadon. Tiuj du movadoj – unu raciiganta la lingvon uzatan por komuniki kun fremdaj homoj kaj la alia raciiganta la skribon uzatan en Japanio (kaj rajtiganta stigmatizitajn dialektojn kaj vortojn de la laborista klaso en la skribado) – estis kernaj sociaj reformoj, kiujn li antaŭvidis kiel parto de longa lukto kontraŭ koloniismo. Li rekomendis mem-determinadon kaj demokration (Asahiga kaj Hagiwara 1978, 126-127).

Kobayashi Tsukasa (1929-2010), kiu esploris la misterojn de Sherlock Holmes kaj komencis verki pri Hidekatsu antaŭ pluraj jardekoj, klarigis, ke same kiel Hasegawa Teru, Hidekatsu estis “eksterulo” rilate la Esperanto-movadon, sed Hidekatsu havis vizion pri liberigo de koloniitaj popoloj, la viktimoj de japana agreso.

La celo de Hidekatsu estis la liberigo de homoj kaj en Japanio kaj en Ĉinio, kaj li kontraŭbatalis lingvan imperiismon. Se li estus vivanta hodiaŭ, li estus rigardata kiel subtenanto de la kultura riĉeco kaj valoro de “lingva diverseco”.

La vidpunkto de Hidekatsu, Kobayashi klarigas, povas esti komprenita kontrastante ĝin al la opinio de la tiutempa registaro (Kobayashi 1978). Tio montras al ni la intelektan medion en kiu Hidekatsu skribis. Sekvas ekzemplo pri tio, kion la registaro diris en tiuj tagoj:

La japana lingvo estas la rekta esprimo de la nacia spirito, kaj respekti kaj protekti ĝin estas la fundamenta rimedo por subteni kaj antaŭenigi la nacian spiriton. Tamen, en la lastaj jaroj, la uzado de nenecesaj fremdaj vortoj kaj frivolaj manieroj, misuzo de honoraj titoloj, misuzo de maldekstre-dekstra skribo ktp. kaŭzis grandan konfuzon en la japana lingvo, kiun ni aŭdas kaj vidas ĉiutage, kaj la efiko de tiu ĉi situacio sur la socia klimato ne estas neglektinda. Mi esperas, ke la registaro prenos taŭgajn rimedojn ĉi-rilate en lerneja edukado kaj socia endoktrinigo.⁶ (Asahiga kaj Hagiwara 1978)

Tio estis la ideologio de la registaro. La japana registaro ne estis scienca. Sed Esperanto estas raciigita lingvo kaj ĝi estas “scienca”. Ĉinaj kaj japanaj

6 「国語は国民精神を直接表現するものなればこれを尊重し且つ愛護するは国民精神を堅持し発揚する根本的法途なり。然るに近時不要なる外国語または軽佻なる流行語の使用、敬語の乱雑、或ひは左横書きの乱用等、日常耳目に入る国語混乱甚だしく、其の社会風潮に及ぼす影響また少なからざるものあるを以て政府に於ても学校教育並びに社会教化等に於て一層この点を重視して適当なる方法を講ぜられんことを望む。」 (Asahiga kaj Hagiwara 1978). Asahiga Noboru estas pseŭdonimo de Kobayashi Tsukasa (1929-2010). Asahiga estis esperantisto. Ĉi tie li pruvas, ke la politiko de la registaro estis ekstrema naciismo en la 1930-aj jaroj.

esperantistoj volis uzi la latinan alfabeton por skribi la ĉinan kaj la japanan lingvojn, do ili raciigis la lingvon.

La ĉefa punkto (kiun mi opinias interesa), estas, ke esperantistoj simpligis kaj raciigis la lingvon, kaj tio estas laŭ mi demokratiigo. Sed oni ne estas dankemaj al esperantistoj. Oni ne aprezas tion, kion esperantistoj faris por ĉinoj kaj japanoj.

La Ĉina Komunista Partio simpligis la ĉinajn signojn. Kial? Ĉar estis premo plifaciligi la skriban lingvon de Ĉinio. Multaj homoj volis simpligi la lingvon. Tiu premo venis parte de esperantistoj. Jen la kerna punkto, kiun mi celas diri.

La ekstremaj naciistoj en la registaro de Japanio volis konservi la tradician skribon de Japanio. Tiu skribo enhavis 10.000 ĉinajn signojn. Bone edukitaj japanaj intelektuloj povis legi tiujn 10.000 signojn, sed tio ne estis facila.

Tamen la naciistoj kaj militaristoj de la Imperio de Japanio (okupanta la plejparton de Orienta Azio) volis daŭre uzi la malfacilan skribsistemon kaj ili volis ĉesigi demokration. Esperantistoj estis demokratiigantoj. Jen unu kialo, kial esperantistoj estis malamikoj de la registaro de Japanio. Hidekatsu esprimis solidarecon kun la azia Esperanto-movado. Tia forta engaĝiĝo al homaj rajtoj kaj kontraŭstaro al koloniismo ne estis kutima ĉe japanaj esperantistoj de tiu epoko (Lins 2008, 52). Pro tio Saitō Hidekatsu estis torturita. Li mortis en 1940 post unu jaro en malliberejo, kie li malsaniĝis je tuberkulozo.

Multaj homoj opinias, ke komunistoj ŝatas demokration, sed en la kazo de Ĉinio, la Ĉina Komunista Partio sub Mao Zedong, post kiam ili ekregis en 1949, kontraŭis la raciigon de la skribo.

3 Konkludo

En Ĉinio kaj Japanio, la plej multaj homoj, kiuj ŝatis la latinan alfabeton kaj Esperanton, estis homoj, kiuj ŝatis demokration, ekzemple socialistoj, komunistoj, anarkiistoj kaj sindikataj aktivuloj. La homoj, kiuj volis ĉesigi la latinan alfabeton kaj Esperanton, estis plejparte kontraŭuloj de demokratio, kiel elitaj registaraj oficistoj kaj intelektuloj. Jen mia impresio post studado de la latinalfabeto movado kaj la Esperanto-movado.

Sube estas la listo de kelkaj el tiuj, kiuj malamis demokration kaj malamis Esperanton, en vicordo de la intenseco de ilia malamo:

1. La sangruĝaj imperiistoj, kiuj subskribis la Traktaton de Versajlo en junio de 1919. Tio rekompenkis la avidecon de la gvidaj imperiismaj ŝtatoj, inkluzive de la Imperio de Japanio.
2. La Naciisma Partio. Male al la komunistoj, ili tute kontraŭis uzi la latinan alfabeton por skribi la ĉinan. Uzado de la latina alfabeto multe

- plialtigus la nombron de kleraj homoj, do ili kontraŭis ĝin.
3. Germanaj nazioj kaj japanaj ultranaciistoj, ĉar ili atakis esperantistojn. Kaj japanoj atakis rekomendantojn de la latina alfabeto. La registaro forpelis Vasilij Eroŝenkon (1890-1952) el la lando. Eroŝenko estis la fama blinda esperantisto de Rusio, kiu estis populara kaj en Ĉinio kaj Japanio. Ĉinoj kaj japanoj amis Eroŝenkon.
 4. En 1941 japanoj “malfondis la ŝanhajan Sin Wenz Study Society kaj subpremis la ĵurnalon *Gazeto de la Amasoj* kaj aliajn publikaĵojn en la nova skribmaniero”,⁷ kaj arestis Ni Haishu (倪海曙, 1918-1988), la plej elstaran historiiston de la latiniga movado (DeFrancis 2006).
 5. Mao Zedong (1893-1976), kiu dorsopikis la laboristan klason. En 1936, Mao diris al usona ĵurnalisto, ke “Latinigo estas bona instrumento por venki analfabetecon”⁸ en Ĉinio, sed en 1950, tuj post la akiro de povo, li ŝanĝis sian opinion (DeFrancis 2006).
 6. Fine, la intelektuloj de Ĉinio kaj Japanio kulpas, mi pensas. Wang Li, “la plej elstara lingvisto de PRC” (Ĉina Popola Respubliko), kiu subtenis la bazan reformon de la ĉina skribsistemo, diris, ke la kontraŭ-ago “venas ĉefe de intelektuloj, precipe de altnivelaj intelektuloj”.⁹ Li estis membro de la elita grupo kiun li kritikis.

La japana intelektulo kiu batalis kontraŭ lingva imperiismo estis Saitō Hidekatsu. Li ofte diris, ke uzi la latinan alfabeton por skribi la japanan helpus multajn malfavoratajn homojn en Japanio, kiel laboristojn, virinojn, infanojn, eksterlandanojn kaj handikapulojn lerni kiel legi kaj skribi. Skriba japana estas tre malfacile lernebla, eĉ por japanoj. La skribmaniero estis ege simpligita kaj raciigita en la postmilita periodo, do estas facile por mi legi gazetartikolojn el la 1950-aj jaroj. Sed eĉ nun, japana infano devas lerni 2.000 aŭ 3.000 ĉinajn signojn, kaj du fonetikajn skribojn (katakana kaj hiragana).

Japanoj lernas 1.000 ĉinajn karakterojn ĝis sia 15jaraĝo. Sed legi la gazeton estas malfacila por iu en tiu aĝo.

En Japanio post 1945, demokratio estis populara. En la milita diktaturo de generalo MacArthur oni efektivigis diversajn demokratiajn reformojn (Unger 1996). Unu el tiuj reformoj estis eksperimento pri instruado de japanaj infanoj per latinigita japana skribo. Ĝenerala Ĉefsidejo (GHQ/SCAP) eksperimentis pri latinigita japana instruado en 100 lernejoj dum tri

7 “They also dissolved the Shanghai Sin Wenz Study Society and suppressed the journal *Newspaper of the Masses* and other publications in the new script.” (DeFrancis 2006, 4)

8 “We believe Latinization is a good instrument with which to overcome illiteracy.” (Snow 1938/1944, 446, citita laŭ DeFrancis 2006, 2)

9 “... Wang Li, the PRC’s foremost linguist, ...” (DeFrancis 2006, 6). “... comes primarily from intellectuals, especially from high level intellectuals.” (Wang Li 1980, 4, citita laŭ DeFrancis 2006, 6)

jaroj. Preskaŭ ĉiuj klasoj estis instruitaj per la latina alfabeto kaj ne per la ĉinaj signoj aŭ la fonetika japana skribo. Kio okazis? Ĉi tiu latinigita japana skribmaniero en edukado estis granda sukceso, sed la registaro de Japanio kaj la usona registaro detruis preskaŭ ĉiujn datumojn de la eksperimento. La kapabloj de la infanoj en ĉiuj fakoj – matematiko, scienco, eĉ la japana – multe pliboniĝis. Ankaŭ la gepatroj ŝatis la programon.

Bibliografio

- Asahiga, Noboru [pseŭdonimo de Kobayashi Tsukasa] kaj Yōko Hagiwara. 1978. *Esperanto undō no tenbō* [Perspektivo sur la Esperanto-Movado]. Tokyo: Sekai bunka kenkyū kai.
- DeFrancis, John. 1950. *Nationalism and Language Reform in China*. Princeton: Princeton University Press.
- DeFrancis, John. 2006. *The Prospects for Chinese Writing Reform*. Philadelphia: University of Pennsylvania. (Sino-Platonic Papers, 171). https://sino-platonic.org/complete/spp171_chinese_writing_reform.pdf (22.04.2024)
- Essertier, Joseph. 2021. "Dangerously Convenient: Suppressing Esperanto and the Latin Script in China and Japan during the 1920s and 1930s." *New Directions* 39: 20–57. <https://nitech.repo.nii.ac.jp/records/6767> (18.06.2024).
- Kobayashi, Tsukasa. 1978. "Gengo sabetsu to tatakatta Saitō Hidekatsu." [Saitō Hidekatsu, kiu batalis kontraŭ lingva diskriminacio]. En *Asahi jaanaru* 15 decembro 1978: 86–91.
- Lins, Ulrich. 2008. "Esperanto as Language and Idea in China and Japan." *Language Problems and Language Planning* 32, kajero 1: 47–60.
- Müller, Gotelind. 2001. "Hasegawa Teru alias Verda Majo (1912- 1947). Eine japanische Esperantistin im chinesischen anti-japanischen Widerstand." En *Cheng – All in Sincerity. Festschrift in Honour of Monika Übelhör*, redaktis Denise Gimpel kaj Melanie Hanz, 259-274. – traduko: Gotelind Müller.
2013. Hasegawa Teru alias Verda Majo (1912-1947). A Japanese Woman Esperantist in the Chinese Anti-Japanese War of Resistance. Heidelberg: University of Heidelberg. <https://doi.org/10.11588/heidok.00015424> (22.04.2024).
- Müller, Gotelind kaj Gregor Benton. 2006a. "Esperanto and Chinese Anarchism 1907-1920: The Translation from Diaspora to Homeland." *Language Problems and Language Planning* 30, kajero 1: 45–73.
- Müller, Gotelind kaj Gregor Benton. 2006b. "Esperanto and Chinese anarchism in the 1920s and 1930s." *Language Problems and Language Planning* 30, kajero 2: 173–192.

Snow, Edgar. 1938. *Red Star over China*. 1st revised edn. 1944. New York: Grove Press.

Unger, J. Marshall. 1996. *Literacy and Script Reform in Occupation Japan: Reading Between the Lines*. New York: Oxford University Press.

Wang, Li. 1980. *Yuwen yu Xinxi*, kajero 1: 4.

Pri la aŭtoro

Joseph Essertier estas lektoro en la Nagoja Instituto pri Teknologio. Trejnita en japana literaturo kaj intelekta historio, lia esplorado temas pri debatoj pli-malpli inter la 1880-aj jaroj kaj 1930-aj jaroj pri parollingva kaj facile lernebla skribreformo por la povigo de malfavorataj grupoj.

Retadreso: essertier.joseph@nitech.ac.jp

ORCID-numero: 0009-0009-7221-6859

Pri la aŭtoro

Joseph Essertier is an associate professor at the Nagoya Institute of Technology. Trained in Japanese literature and intellectual history, his research is about debates between the 1880s and 1930s concerning colloquial and easy-to-learn writing reform for the empowerment of disadvantaged groups.

著者について

ジョセフ・エサティエ氏は名古屋工業大学の准教授。1880年代から1930年代にかけての日本文学と思想史を専攻し、弱者のために行われた漢文体から口語体へと大きく変化した言語改革運動の歴史について研究している。

The unrealized and forgotten power of Esperanto: Rationalizing and democratizing language in China

Abstract: Children in China and Japan today need to learn thousands of Chinese characters in order to read newspapers. Objectively speaking, Chinese characters are a major obstacle for China's 1.4 billion people. They are an obstacle to obtaining information, sharing information with others, and participating in society. Increasing the number of people who are literate was one of the goals of the romanization movement in China and Japan.

This paper discusses the history of the birth of pinyin, the Latin script in which the Chinese language is written. Latinxua Sin Wenz (literally, the "Latinized New Script"), that laid the groundwork for the pinyin that is used in China today, originally came about, in large part, as the result

of the Esperanto dream and movement in China and Japan. Light is shed on how the Esperanto movement, that contributed to the Romanization of Chinese, developed as a language reform movement that made the rationalization and democratization of writing one of its goals.

Keywords: Esperanto; democracy; universal; China; Roman, alphabet

活かされること無く忘れ去られたエスペラントの力：中国における言語の合理化と民主化

要旨:現在の中国や日本の子どもたちが新聞を読むためには、数千字の漢字を覚える必要がある。客観的に見れば、中国の14億の人々にとって、漢字は大きな障害である。情報を得ること、他の人々と情報を共有すること、社会に参加することの障害なのだ。読み書き能力を持っている人々を増やすことが、中国と日本におけるローマ字運動の目標の一つだった。

本稿では、「中国語をローマ字で表記するピンインの成り立ちの歴史」について考察する。現在中国で使用されているピンインの基礎となった「ラテン化新文字」の起源は中国と日本におけるエスペランチストの夢と運動が大きく関与した。さらに、中国語ローマ字化を推し進めたエスペランチストらの運動が、文字の合理化と民主化を目指した言語改革運動からどのように発展したかについても焦点を当てる。

キーワード:エスペラント、民主主義、中国、ローマ字、ユニバーサルデザイン